ĈEA-retkomunikoj 1/2008

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio

sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi gxin, suficxas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:


1. Dauxra Esperanto-ekspozicio farigxos cxi-jare realajxo
2. La 3-a Sabla Printempo
3. Oficiala Esperanto instruado en du cxehxaj universitatoj
4. Nobel-premio kaj Esperanto
5. Kelkaj interesaj ret-ligiloj
6. Cxehxa Esperanto-junularo aktivas (oficiala rubriko de CxEJ)
7. Cxehxa televido raportis el Brno pri Esperanto
8. Kalendaro de Esperanto-arangxoj en Cxehxio (aux organizataj el Cxehxio)


1. DAUxRA ESPERANTO-EKSPOZICIO FARIGxOS CxI-JARE REALAJxO.

Jam 15 jarojn funkcias ene de la urba muzeo en Česká Třebová (laux la subskribita kontrakto pri kunlaboro inter gxi kaj la Cxehxa Esperanto-Asocio) fako "Historio de Esperanto en cxehxaj landoj". Bedauxrinde gxis nun oni ne sukcesis arangxi ekspozicion, do la poresperanta fako de la urba muzeo en Česká Třebová farigxis pli depozito de esperantajxoj. Tio estas memkomprene ankaux tre valora tasko, precipe por konservi la esperantajxojn por estontaj generacioj. La plej granda kontribuanto estis la Klubo de esperantistoj en Prago per disponigo de biblioteko konsistanta el 6500 libroj, sed ankaux kontribuis pluraj kluboj kaj individuaj esperantistoj de la tuta Cxehxio.

Tamen, CxEA dauxre revis kaj plu revas pri dauxre atingebla Esperanto-ekspozicio. Kaj cxi tiun revon eblos realigi cxi-jare. CxEA uzis oferton de la urbo Svitavy kaj preparas en la kunlaboro kun la urbo muzeon de Esperanto en la Domo de Ottendorf en Svitavy, kiu havos inter alie ekspozicion dauxre viziteblan de publiko. Dum la preparo de la ekspozicio gxi kunlaboros kun la urba muzeo en Česká Třebová kaj precipe gxia fako "Historio de Esperanto en cxehxaj landoj".

La inauxguro okazos du semajnojn antaux la CxEA-kongreso. Do eblos uzi la relativan proksimecon de Přerov kaj Svitavy kaj survoje al aux el la kongreso viziti la novan Muzeon pri Esperanto. Ni esperu, ke gxi estos vere vizitata, cxar de la nombro de vizitantoj ankaux dependas gxia dauxra ekzisto. Do jam nun cxiuj cxehxaj esperantistoj estas petataj helpi al la disvastigo de la informoj pri la Esperanto-muzeo kun dauxra ekspozicio en Svitavy (regiono Pardubice).

2. LA 3-a SABLA PRINTEMPO

Ĉeĥa Esperanto-asocio kunlabore kun internacia organizo E@I invitas vin al _*la 3-a Sabla Printempo - 4.-6.4.2008 en Písek*_, ĉi-foje omaĝe al centjariĝo de la loka klubo.
Programo: Vendrede vespere Praktika prezentado „Esperanto en Interreto“
Sabate antaŭtagmeze Bunta kultura matineo en la burga arealo
Sabate vespere Kultura vespero

Sabate posttagmeze kaj dimanĉe antaŭtagmeze okazos paralele 3horaj
programoj en 3 grupoj:
1. Trejnseminario por komencantoj pri kontribuado al interreta
enciklopedio Vikipedio
(ĉeftemo – Turismaj vidindaĵoj de Ĉeĥio, gvidos reprezentantoj de E@I
Yves Nevesleen el Belgio kaj Marek Blahuš, Miroslav Malovec kaj Jan Urbánek,
administranto de ĉeĥa Vikipedio)
2. Paroliga lingvoseminario (gvidos M.Tomečková) kaj
3. Turisma programo en Písek.
Danke al supozata subvencio de la urbo Písek kaj de la fonduso TILIO de
ĈEA la partoprenkotizo estas nuraj _590,- Kč_, kiuj inkluzivas: 2
tranoktojn en 3-lita ĉambro en hotelo BULY, kompletan programon, studajn
kaj turismajn materialojn kaj KDojn kaj sabatajn tagmanĝon kaj
vespermanĝon en la restoracio.
Bonvolu ĝustatempe peti pli detalajn informojn kaj aliĝilon ĉe
esperanto.pisek@seznam.cz.

3. OFICIALA ESPERANTO-INSTRUADO EN DU CxEHxAJ UNIVERSITATOJ

Jam ekde la 1977a jaro Germain Pirlot (BE) kompiladas informojn pri oficiala Esperanto-instruado en universitatoj tra la mondo. En la TTT-ejo de UEA aperis lia la plej nova, jam la 13-a, listo pri Esperanto-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj (samgradaj) altinstitutoj. Gxi estas konsultebla cxe: http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj.html.
Kiel vi povas vidi klakante al Cxehxio, en nia lando oni instruas Esperanton en la universitatoj en Brno kaj Olomouc, ambauxloke gxin instruas d-ro Josef Vojáček, kiu certe meritas nian publikan dankon.

4. NOBEL-PREMIO KAJ ESPERANTO

Laux la deklaro de Nobel-Instituto, cxi-jare estas 197 kandidatoj por la Nobelpremio pri paco. Pli estis nur unufoje en la historio (199 en 2005). Estas gxojinde, ke inter ili estas ankaux Universala Esperanto-Asocio (UEA) pro sia centjara porpaca aktivado. Oni plurloke tamen povas vidi, ke la proponato estas "La internacia lingvo Esperanto", ekzemple cxe cxe prestigxa cxehxa portalo idnes.cz. Vidu http://zpravy.idnes.cz/nobelova-cena-za-mir-ma-letos-197-kandidatu-fpf-/zahranicni.asp?c=A080227_151631_zahranicni_jte.
La instituto neniam publikigas la nomojn de kandidatoj, do la agentejoj eliras nur el la deklaroj de tiuj, kiuj ilin kandidatigis. La eraro do frontas versxajne de erara mencio, eble pro forgeso de la nomo de la proponita instituto (UEA) flanke de iu jxurnalisto, kiun la ceteraj jxurnaalistoj simiosimile ripetas.
Ni aldonu, ke cxi-jare oni plej multe parolas pri probabla venko de eksa germana kanceliero Helmut Kohl aux algxeria sxtatprezidanto Abdal Azíz Buteflika.
Malgraux tio, ke estas malprobable, ke UEA vere ricevos la Nobel-premion, tiu kandidatigo, kiun gxi certe meritas, havas sendube grandan propagandan valoron, kiun indas eluzi.
La artikolon pri la gxusta nomumigo de UEA vi povas vidi cxe
http://www.kontakto.info/Svisaj_parlamentanoj_proponas_Nobel_Pacpremion_por_Universala_Esperanto-Asocio_UEA.html

5. KELKAJ INTERESAJ RET-LIGILOJ

Certe tre grava estas eblo sekvi la agadojn de Euxropa Esperanto-Unio EEU en Bruselo:
http://europo.eu/. Rekta ligilo al la Euxropaj bultenoj (aperis jam 66) estas

http://europo.eu/index.php?art=4

Versxajne la plej ampleksa katalogo de havebla Esperanto-muziko, elekteble en Esperanto, la angla kaj la franca lingvoj. Maldekstre klaku al gxenro, pri kiu vi interesigxas:
http://www.vinilkosmo.com

La retejo MusicExpress disponas je esperanto-traduko kaj en la muzikkategorio "Esperanto" listigas

informojn kaj senpage elsxuteblajn muzikspecimenojn de pli ol 200
kantistoj kaj muzikgrupoj: http://www.musicexpress.com.br/eo

Multlingva prikomputila terminokolekto: http://www.komputeko.net

Pri genealogio: http://worsten.org/indeksoj/indekso_eo.htm

Pri katolika eklezio en Cxehxio: http://www.cirkev.cz/eo/

Pri la entrepreno Colsys (sekurigaj sistemoj): http://www.colsys.cz/eo-01news-90hbd.php

Pri la pensiono posedata de esperantisto d-ro Josef Hradil
http://home.tiscali.cz/penzionespero/esperanto/espindex.htm

Pri kongresa kaj kleriga agentejo kaj eldonejo de Petro Chrdle: http://www.kava-pech.cz/esperanto

6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) travivis sian gxis nun plej grandan amaskomunikilan sukceson, kiam gxi pretigis raportajxon sekve aperintan en Cxehxa Televido. Pli detale pri tio legu en aparta kontribuo. Krome tamen januaro kaj februaro estis influitaj de okazanta ekzamenperiodo.

Marek BLAHUŠ venontsemestre studos en Loveno (Belgio), tamen li intencas resti prezidanto de CxEJ. Antauxe junie li cxe la Masaryk-Universitato defendos bakalauxran disertajxon pri "literumilo por esperanto".

Inter la 10-a kaj 14-a de januaro Cxehxion vizitis Boris ARRATE VERANES, kuba esperantisto el Hungario. Lian vojagxon tra Brno, Praha kaj Karlovy Vary arangxis CxEJ kaj gxiaj kluboj. En Prago tiam cxeestis ankaux brazila esperantisto Joseval.

Plu dauxras la kontaktoj kun Ukrainio. Februare Jan POPELKA kaj marte Karol RYDLO vojagxis al Kievo. La unua revoje vizitis ankaux Boris apud Budapesxto. Artikolo pri la somera "Vojagxo al Ukrainio" verkita de Mirek HRUŠKA aperis en TEJO Tutmonde 2007:6.

Novjare 7 gejunuloj partoprenis en la arangxoj Ago-Semajno (Pollando) kaj Internacia Seminario (Germanio). Raportajxoj pri tio kaj cxiuj aliaj aktualajxoj pri cxehxa junularo troveblas cxe http://cej.esperanto.cz/

7. CxEHxA TELEVIDO RAPORTIS EL BRNO PRI ESPERANTO

Marde la 19-an de februaro 2008 matene post la sesa horo en la unua kanalo kadre de regiona elsendo por Moravio kaj Silezio, kaj sekve denove post la nauxa horo en la dua kanalo tutlande elsendis Cxehxa Televido en sia programo "Dobré ráno" ("Bona mateno") duminutan raportajxon pri Esperanto, antauxe registritan la 31-an de januaro en la klubejo de la Klubo de esperantistoj en Brno, dum cxeesto de 9 CxEJ-uloj kaj 2 klubanoj. La redakcio mem unue alparolis la esperantistojn.

Ciferecan registrajxon de la raportajxo, en kiu aperas Marek BLAHUŠ, Jan POPELKA, Karol RYDLO kaj Irena PAJEROVÁ (malgraux mise montrataj nomoj de la lastaj du), pretigitan de Karol RYDLO (alian pretigis Míša FILIP) oni disponigis al membroj kaj simpatiantoj de CxEJ per la retejo dotSUB.com, kie volontuloj jam kreis plurajn alilingvajn subtekstojn: http://dotsub.com/films/dobrrnozmoravyaslezskaesperanto/

Jen rektaj ligiloj al auxtomate startantaj kelkaj lingvaj versioj:
* http://tinyurl.com/yponrn - origina cxehxa versio, sen subtekstoj

* http://tinyurl.com/2hqof7 - versio kun subtekstoj en Esperanto

Televide la raportajxo atingis kelkdek mil spektantojn, la retan registrajxon jam spektis pli ol 800 homoj. Rezulto estis kelkaj vizitoj al la retpagxaro de CxEJ, unu retposxta peto kaj plialtigxo de la konscio pri Esperanto en Cxehxio. Priskribon kaj fotojn de la registrado de la raportajxo sercxu cxe http://esperanto.blahus.cz/cxej/?televido

## 8. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO

2008-03-18/06/22 okazos en Urba Palaco Templ en Mladá Boleslav ekspozicio VIVANTA LINGVO ESPERANTO, kiun organizas Esperanto-klubo Mnichovo Hradiště + Mladá Boleslav. Inf.: vanekmi@centrum.cz aux drahotovaesperanto@seznam.cz.

2008-04-04/06: Sabla Printempo en Písek, turisma, kultura kaj faka programo (kun dauxrigo de la seminario "Esperanto en la reto"). Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

2008-04-11/13: Adonido, renkontigxo de natur- kaj vin-amantoj en Vracov + Ratíškovice. Inf.: melicharkova8@seznam.cz

2008-04-14/21: Printempa E-seminario organizata de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, Skokovy (Cxehxa Paradizo). Inf.: nechvilep@seznam.cz

2008-05-31: Infana tago en Svitavy. Inf.: dvor.libuse@seznam.cz

2008-06-07: Esperanto-renkontigxo de natur- kaj danc-amantoj en Česká Třebová, inf.: zn.esperanto@seznam.cz

2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09. Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, la Esperanto-arangxo kun la plej longa tradicio en Cxehxio, jam

kvindekan fojon en la sama loko! Cxiutaga antauxtagmeza lauxelekta instruado de lingvo (cxiam ankaux Esperanto elekteblas). Inf.: podhradska@volny.cz

2008-07/28-08/04: KRISTANA KONGRESO (la 58-a kongreso de KELI) en la hotelo ESPERANTO en Pribylina, Slovakio. Dua favora aligxperiodo dauxras fxis la fino de marto. Pliaj informoj kaj aligxiloj: Pavel Polnický, cea.polnicky@quick.cz

2008-08-23/30: EKOTUR 08, Tradicia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj kun komunaj vesperaj programoj. Karlštejn cxe Prago, inf.: http://www.kava-pech.cz/ekotur aux chrdle@kava-pech.cz

2008-09-20/21: Solena inauxguro de dauxra Esperanto-ekspozicio cxe urba muzeo en Svitavy. Inf.: dvor.libuse@seznam.cz

2008-10-03/05: La 12-a kongreso de Cxehxa Esperanto-Asocio, kun elekto de novaj komitatanoj de CxEA en Přerov. Inf.: jirka.tomecek@post.cz.

2008-10-06/12: InPaSem 2008 (Internacia Paroliga Semajno), Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Antauxtagmeze instruhoroj, posttagmeze turisma programo en Prago kaj cxirkauxajxo. Dobřichovice, inf.: http://www.kava-pech.cz/inpasem/ aux chrdle@kava-pech.cz.

2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: http://www.kava-pech.cz/kaest aux chrdle@kava-pech.cz

2008-11-28/30: IKF (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem, inf.: m.smycka@seznam.cz

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio, aux organizataj el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe http://www.eventoj.hu/kalendar.htm

Cxu vi ne trovis vian arangxon en la listo? Ne kulpigu nin, sed vin mem, ja ne eblas envicigi eventon, pri kiu ni ne konscias. Pri la preparataj arangxoj bv. sendi informon al chrdle@kava-pech.cz, ke gxi povu esti envicigita en la venontan Kalendaron.